
# CARLAND Cross

M. OLEFFE O. GRENSON

## 3 TUNELO




ESPERAĴO

**Originala titolo:** *Carland Cross 3: Tunnel*
**Aŭtoroj:** Michel Oleffe, Olivier Grenson
**Jaro de originala publikigo:** 1993


Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, junio 2025
**Esperanta traduko kaj kompostado:** Mikaelo Kastro





UNU SOMERAN VESPERON, 1936. IE ĈE LA MARBORDO DE KORNVALO.
VE, LA ARBARO FARIĜAS TRE DENSA, MIA KNAB'!
RHEU
RHEU
PAF
DIABLE! NUR MANKIS ĈI TIO!
MI PROVOS RIPARI LA AŬTON, MAJSTRO. MI JA ESTAS SUFIĈE BONA MEĤANIKISTO.
EN ORDO, ANDY. MIAFLANKE, MI FAROS ESPLORETON EN LA AREO.
HO, JEN LUMO! DO ESTAS IU TIE, ĈU NE?


HO!
FORLASITA DOMO! LA FAJREGO DETRUINTA ĜIN NE DATIĜAS DE HIERAŬ, VERŜAJNE. KIU PROMENUS ĈI TIE?
STRANGE. ODORAS JE PETROLO...
SALUTON. ĈU IU TIE?
HE! KIO ESTAS TIO?
?


TÛÛT
ANDY?!
TÛT
TÛT
ESTIS NENIO, MAJSTRO. NUR AJUTO, KIU ŜTOPIĜIS. ĈU VIA PROMENADO IRIS BONE?
ĜI ESTIS CERTE UNIKA, MIA KNAB'. NI FORIRU!
POST DUONHORO, LA VETURILO DE LA DETEKTIVOJ ALVENIS AL LA ĈEMARA VILAĜETO MANACCAN.
JEN GASTEJO, LAŬDON AL DIO!
THE RED LION
BONAN VESPERON, SINJOROJ. BONVENON EN «LA RUĜA LEONO», KION MI POVAS FARI POR VI?
NI BEZONAS DU KOMFORTAJN ĈAMBROJN, DU VARMAJN BANOJN KAJ DU ABUNDAJN MANĜOJN, GASTEJESTRO.
ESTAS STRANGE VIDI TIEL PERFEKTAJN ĜENTLEMANOJN EN ĈI TIU PERDITA ANGULO DE L' MONDO. LA ARBARO ST. MARY'S HEAD APARTIGAS NIN DE LA RESTO DE LA MARBORDO... KAJ ĈI TIU VILAĜO NE ESTAS TRE FREKVENTITA, ĈEFE NE DUM LA NOKTO.
AL NI ŜAJNIS EKVIDI LUMON SUBITE.
TIO ESTIS LA FANTOMO DE BYRON GARRISON. LI ANKORAŬ VAGAS ĈIRKAŬ SIA DOMEGO, DEK JAROJN POST LA FAJREGO, KIU ĜIN DETRUIS.
3
GRENSON-OLEFFE


POST LA VESPERMANĜO
ĈU VI TRINKOS BRANDON, SINJOROJ ? ĜI BONE KONGRUAS KUN LA ŜAFIDAĴO KAJ LA SIROP-KOVRITAJ KRESPOJ.
NUR SE VI KUNTRINKAS LA BOTELON KUN NI, SINJORO MALLISTER.
SINJORO MALLISTER, DIRU... VI NE KREDAS JE FANTOMOJ, ĈU NE?
LA MEMORO PRI BYRON GARRISON RESTIS TIEL ENRADIKIĜINTA EN ĈI TIU VILAĜO, KE NENIU KURAĜAS PROKSIMIĜI AL LA RUINOJ.
NUN RUINOJ, ĈU? SED ANTAŬE VI PAROLIS PRI LUMOJ...
TIUJ VAGLUMOJ APERAS FOJFOJE. TIO ESTAS FARO DE L' DIABLO, MI CERTAS. GARRISON RE-VENAS AL TIE, KIE LI FARIS SIAJN ESPLOROJN...
KIUJN ESPLOROJN?
GARRISON ESTIS INĜENIERO. LA DOMEGO GARRISON ENHAVIS LABORATORION. ONI DIRAS, KE TIE LI KREIS MAŜINOJN DE KONSTRUA INĜENIERIO. MI CERTIGAS VIN, KE NI ĈIUJ ESTIS TIMIGITAJ!
SED, KION VI TIMIS?
LA SUBMARAJN BRUOJN. ILI SONIS KIEL MORDOJ. KRAK! KRAK! NUR REMEMORANTE TION... HO, MI BEZONAS PLI DA BRANDO!
KIO OKAZIS?
UNU NOKTON, ĈIO EKBRULIS. ONI AŬDIS SUBTERAJN EKSPLODOJN. SPITE LA TIMON, MI KAJ ALIAJ VILAĜANOJ PROKSIMIĜIS AL LA DOMEGO. MALAPERIS GARRISON KAJ LIA FILINO, DEKJARAĜA KNABINO. EKDE TIU MOMENTO, NENIU IRIS EN TIUN PARTON DE LA ARBARO.
KELKAJN TAGOJN POSTE, NI REIRIS AL STRATO BAKER. LA TEMPO PASIS. LA MAJSTRO ŜAJNE FOR-GESIS LA HISTORION DE BYRON GARRISON, ĜIS...


SINJORO CROSS... JUNA VIRINO INSISTAS, KE VI DEVAS PAROLI KUN ŜI, MALGRAŬ TIO KE ŜI NE HAVAS ARANĜITAN RENDEVUON. ŜI ŜAJNIS AL MI TRE KOMPATINDA, KAJ...
BONE, BONE. SINJORINO STONE, ENLASU ŜIN.
BONAN VESPERON, FRAŬLINO...
COLLINWOOD, BARBARA COLLINWOOD. MI PETAS VIAN PARDONON, SINJORO CROSS, SED ESTAS URĜE...
RAKONTU AL MI TIUN URĜAĴON, DO. FRAŬLINO COLLINWOOD, ĈU MI RAJTAS PROPONI AL VI TEON KUN BERGAMOTA ESENCO?
CERTE, SINJORO CROSS. NU, MIA FRATO HOWARD MALAPERIS. MIAJ FRATINOJ KAJ MI ESTAS TRE ANGORPLENAJ DE ANTAŬ TRI TAGOJ. HOWARD ESTAS LA APOGO DE NIA FAMILIO EKDE LA FORPASO DE NIAJ GEPATROJ.
ĈU VIA FRATO NE LASIS NOTON POR VI?
JES, TRE MALLONGAN NOTON, KUNE KUN IOM DA MONO. LI DIRIS, KE NI NE MALTRANKVILIĜU, KE LI DEVIS PRILABORI ION KONFIDENCAN...
KIE LABORIS VIA FRATO?
ĈE LA HONORINDAJ CALBOUR KAJ WILLCOTT, ENTREPRENISTOJ KAJ POGRANDISTOJ, PROKSIME DE NORWAY GATE. HOWARD OKUPIĜIS PRI KONTADO, EKDE KIAM LI FINIS SIAJN STUDOJN PRI INĜENIERIO.
ĈU LI NE DIRIS AL VI ION STRANGAN LASTATEMPE?
NE, LI NE ESTIS TRO PAROLEMA. LI JA PAROLIS PLI KUN NIAJ PLI JUNAJ FRATINOJ... ATENDU, JES! LI ESTIS IOM ZORGOPLENA PRI KELKAJ MALAPEROJ EN LA KONSTRUA SEKTORO... LI TROVIS TION STRANGA!
MALAPEROJ, ĈU?
JES. NE NUR ĈE CALBOUR KAJ WILLCOTT. ANKAŬ EN ALIAJ FIRMAOJ.
JES! METROPOLA POLICEJO? KUN SUPERINTENDANTO WINGFIELD, BONVOLE. WINGFIELD, KIEL VI FARTAS? NU, ĈU VI AŬDIS PRI MALAPEROJ EN LA KONSTRUA SEKTORO LASTATEMPE?
DIABLE, CARLAND! KIEL VI EKSCIIS TION? VI ESTAS DINAMITO! MI NEPRE VIDU VIN TUJ!
OF LONDON



NU, FRAŬLINO COLLINWOOD, MI PROMESAS OKUPIĜI PRI LA MALAPERO DE VIA FRATO.
DANKON PRO ĈIO, SINJORO CROSS. MI ESTAS JE VIA DISPONO, OKAZE KE VI BEZONAS KROMAN INFORMON...
ANDY, AKOMPANU LA FRAŬLINON AL LA PLEJ PROKSIMA TAKSIHALTEJO, MI PETAS. KAJ INFORMU VIN PRI LA FIRMAO DE CALBOUR KAJ WILLCOTT.
MI... EN ORDO, MAJSTRO.
SINJORINO STONE, PREPARU LA VESPERMANĜON, KAJ ALDONU UNU PLIAN MANĜILARON. SUPER-INTENDANTO WINGFIELD NIN AKOMPANOS ĈI-NOKTE...
BONE, SINJORO.TIU MANĜEMULO NENIAM MALTRAFAS OKAZON!
DRING
BONAN VESPERON, KARA MILDRED... HMM, ODORAS JE FRITITA FROMAĜO KUN ORANĜA ĴELEO. KIA BONŜANCO, KUNLABORI KUN CARLAND CROSS!
NU, NU!
NU, KIO OKAZAS, WINGFIELD?
STRANGEGA AFERO, MALNOVA AMIKO. DE ANTAŬ KELKAJ MONATOJ, MALAPERAS KONSTRULABORANTOJ, ĈEFE MASONISTOJ. ONI DEVIS ATENDI LA JARAN KUNVENON DE ENTREPRENISTOJ, ĈI-SOMERE EN CRYSTAL PALACE, POR KONTROLI LA GRAVECON DE LA PERDOJ. LORDO BASINGSTOKE ESTAS MALTRANKVILA, KAJ LI SCIVOLAS PRI ĈIO ĈI...
CETERE, ŜAJNE ONI DELOGIS TIUJN VIROJN PROMESANTE AL ILI EKSTERORDINARAJN ENSPEZOJN, SED ILIAJ FAMILIOJ PRISILENTAS TION! NEKLARIGEBLAĴO!
MIA KARA MARMADUKE, ĈU VI VOLAS PLI DA ŜINKO KUN ŜEREO?
TIO ESTUS NUR LA KVARA FOJO.
BONAN VESPERON, SINJORO WINGFIELD. MAJSTRO, MI ĴUS REVENIS DE NORWAY GATE. MORGAŬ MATENE MI KOMENCOS LABORI ĈE LA HONORINDAJ CALBOUR KAJ WILLCOTT...
NU, MIA KNAB'...
NI REKONTIĜOS TIE. MI DECIDIS FARI VIZITON AL ILI MORGAŬ, POST LA SUNSUBIRO.


LA SEKVAN VESPERON
CALBOUR & WILLCOTT
BONAN VESPERON, SINJORINO, ĈU VI POVUS SCIIGI AL SINJOROJ CALBOUR KAJ WILLCOTT, KE CARLAND CROSS VOLAS PAROLI KUN ILI?
ESTAS HONORO BONVENIGI LA DETEKTIVON, KIU... LA DETEKTIVON, KIU... HE! ĈU NE, WILBUR?
JES JA, ESAIAH, KIA HONORO! SED KION POVAS FARI NI POR VI, SINJORO CROSS?
MI NE ESTIS SENDITA OFICIALE, SINJOROJ. MI ESPLORAS LA MALAPERON DE HOWARD COLLINWOOD. ĈU VI RAJTIGAS MIN TRARIGARDI LIAJN POSEDAĴOJN?
CERTE JES, SINJORO CROSS, LA NEKLARIGEBLA FORIRO DE TIU JUNA VIRO MALTRANKVILIGAS NIN SAMKIEL VIN, VERE.
LIA OFICEJO. KOMPATINDA HOWARD!
ĈIO ESTAS TRE PERFEKTE ORDIGITA... EĈ TRO ORDIGITA!
NU, NU!
ENGINEER MECHANIC
HOWARD COLLINWOOD
KIE DIABLE MI VIDIS TIUN ĈI DESEGNAĴON ANTAŬE?
NI ESTAS NEPROBLEM-EMAJ VIROJ, SINJORO CROSS, KAJ HOWARD ES-TIS ĜENTILA JUNA VIRO. REVENU KIAM VI VOLOS, SINJORO CROSS.





POSTE, EN STRATO BAKER...
SINJORO CROSS, ANDY VOLAS PAROLI. LI SONAS TRE SKUITA!
MAJSTRO, TUJ VENU AL «LA BLANKA PAVO», TAVERNO EN VOJO ABBEYFIELD. MI ARANĜIS RENDEVUON KUN MALJUNA EBRIULO NOMATA WALT SNOTTS, LA TRANSPORTISTO DE CALBOUR KAJ WILLCOTT.
TIU LOKO ESTAS MALBONA, JUNA AMIKO. ESTU SINGARDA. MI VESTIĜOS TAŬGE KAJ TUJ IROS TIEN.
Ladies HAIRDRESSING
ESTAS PLI PRUDENTE FARI LA RESTON DE LA PROMENADO PIEDE. VAGABONDO EN AŬTOMOBILO ALTIRUS MULTE DA ATENTO.
MAGIC LAND
JEN LA DRINKEJAĈO DE LAMA BEN, VERA DIBOĈULO.
TE PEACOCK
CIGARETTES
BENNY, KIA SURPRIZO! MI NE ATENDIS VIN EN LONDONO! VENU DRINKI GLASON, FRIPONO!
SALUTON!
WALT, ĈI TIU VIRO ESTAS BENNY. LI ESTAS MIA DELONGA KAMARADO. BENNY, JEN WALT SNOTTS, VERA FAKULO PRI MALHELAJ BIEROJ...
ĈU FAKULO AŬ NE, ĈI TIE ONI NE INTERESIĜAS PRI FREMDULOJ. DRINKU DO VIAJN BIEROJN, KAJ **PAFU VIN FOR!**



HE, BEN. NE FARU TIUN MIENON. ONI PAGAS MIAN BIERON! TIO NE OKAZAS OFTE. KAJ LA BRUNA BIERO DE NEWCASTLE ESTAS BONEGA!
ĜUSTE TIO MALTRANKVILIGAS MIN, WALT. NENIU PAGAS BIERON AL VI.
NE ATENTU LIN, BENNY. LAMA BEN ESTAS MALJUNA GRUMBLEMULO. KIAL VI VENIS ĈI TIEN?
MI SERĈAS LABORON. TAMEN, MI NE SCIPOVAS FARI MULTE.
NU, BENNY, VI ESTIS MASONISTO ANTAŬ OL VI EKNAVIGIS.
MASONISTO... ĈU? NU, BEN! PLENIGU ALIAN KRUĈON POR MI, MI SOIFAS!
HIK... BENNY, VI ESTAS BONŜANCA. MIAJ ESTROJ SERĈAS EKZAKTE TION; MASONISTOJN. LA ANTAŬAJ MASONISTOJ FORIRIS. HIK! ONI DEVAS AGNOSKI, KE OKAZAS STRANGAJ AFEROJ... ĈE CALBOUR KAJ WILLCOTT!
JEN VIAJ BIEROJ, DRINKEMULOJ. POSTE, IRU AL ALIA LOKO POR FINI VIAN NOKTON.
KIOM «STRANGAJ»?
JA TRE STRANGAJ... ONI HAVAS IAN PECON, KIU MALFERMAS MUROJN, KAJ LA VIROJ FORVAPORIĜAS... MI VIDIS LA OFICEJON TURNIĜANTAN, ULOJ!
ĈU VI CERTAS, KE VI NE ESTIS EBRIEGA, WALT?
SCHLAC
MI NE ŜATAS VIAN INTERPAROLADON, KAMARADOJ. TUJ FORIRU ANTAŬ OL MI TRABOROS VIN.
9.


MI NE REVIDU VIN ĈI TIE DENOVE, STUKAĈOJ!
BEER
HIK! VI NE ESTAS TRE GASTAMA, BEN... HIK!
TIU TAVERNESTRO NE ESTIS TRO AFABLA, ĈU?
SILENTU, MIA KNAB', ONI SEKVAS NIN!
KIAM NI TRANSIROS LA PONTON, KURU TIOM, KIOM EBLAS!
LAUNDRY
69
NUN!
HE!
HASTU, ANDY! AL STRATO SILWOOD!
ĈI TIE NE ESTAS LOKO POR KAŜIĜI, JEN NIA FINO!
FARU UNU ETAN STREBON, ANDY, MI ĴUS AŬDIS AŬTOMOBILON!
BRAITHWAITE & DEAN L[TD]
NI IRU SUB LA PLANKON DE LA PONTO!
CARLAND CROSS! KIA KOINCIDO!
10



EBLE TIO ESTAS NUR KOINCIDO, SED TIU DIABLA DETEKTIVO VENIS EN NIAN MAGAZENON ĈI-VESPERE.
KIAL VI NE SCIIGIS TION AL NI PLI FRUE?
MI FARIS ĈION, KION MI POVIS, SINJORO CALBOUR.
BONE, MOVIĜU VI ĈIUJ! ILI NE POVIS IRI TRO MALPROKSIMEN!
NENION MI VIDAS!
PROBABLE ILI KAŜIĜIS EN LA RUINIĜINTAJ KONSTRUAĴOJ, MALPROKSIME DE ĈI TIE.
NI NE TROVOS ILIN, WILBUR!
MI TIMAS, ESAIAH! NI REIRU AL LA MARBORDO ĈI-NOKTE. NU, GARRISON JA ESTAS...


LA PASINTA NOKTO ESTIS TIEL MALKVIETA KIEL FRUKTODONA, MIA KNAB'. NUN MI SCIAS KIE MI VIDIS ANTAŬE LA DESEGNAĴON ĈE LA KAJERO DE HOWARD COLLINWOOD.
STRATO BAKER...
SINJORINO STONE, BONVOLU FARI POR NI ABUNDAN MATENMANĜON, NI HAVAS MULTE DA LABORO.
SED, MAJSTRO... TIU VIRO MORTIS EN LA BRULEGO DE SIA DOMO. LA GASTEJESTRO ESTIS TRE CERTA.
VIZITU SPRATT-ON ĈE LA ARĤIVEJO DE LA METROPOLA POLICEJO. KAJ FARU, KE IU EKZAMENU LA KAJERON DE HOWARD COLLINWOOD. MI PROVOS ELTROVI PLI DA INFORMO PRI ĈI TIU STRANGA OBJEKTO...
MI ANKORAŬ NE KOMPRENAS LA UTILON DE ĈI TIU METALA DISKO, KIUN MI TROVIS LASTAJARE EN LA DOMEGO GARRISON. KROM SE GARRISON IEL RILATAS AL CALBOUR KAJ WILLCOTT.
EBLE, JUNA VIRO. PREFERE DIRU, KE ONI NE TROVIS RESTAĴOJN DE GARRISON KAJ LIA FILINO. ESPLORU TIUN KURIOZAN INĜENIERON.
LA MALJUNA MATTS! LI ANKORAŬ ESTAS DEDIĈITA AL SIAJ MEĤANIKAĴOJ.


DING
CARLAND! KIA ĜOJA SURPRIZO! EKZAKTE NUN MI CELIS REVIZII MIAJN PLEJ ŜATATAJN AŬTOMATOJN: ARNOLD-ON KAJ DOROTHY-ON.
KIAJ MIRINDAĴOJ, MATTS. VIA KOLEKTO VERE ESTAS UNU EL LA PLEJ BELAJ EN ANGLUJO. FAKTE, MI ŜATUS ALVOKI VIAN SEN-EGALAN SCION PRI MEĤANIKO.
ĈU VI SCIAS, KIO ESTAS ĈI TIO?
DIO MIA, CARLAND! LA SERURO... LA SERURO DE BEAUMONT!
EKSTERORDINARA AFERO! MI KREDIS, KE MI NENIAM POVUS VIDI ĈI TION PERSONE!
KIO ?!
FREDERICK BEAUMONT ESTIS PROMESPLENA INĜENIERO, KIU KONSTRUIS SERION DA MIRINDAJ MAŜINOJ KVINDEK JAROJN ANTAŬE. LI LASIS POST SI MULTAJN PROJEKTOJN DE NEKUTIMA KOMPLEKSECO, NEKONSTRUEBLAJ PER LA TIUTEMPAJ RIMEDOJ. LI ESTIS VIZIULO DE KONSTRUA INĜENIERIO.
KIAJN PROJEKTOJN?
BEAUMONT PRILABORIS MAŜINOJN POR BORI GALERIOJN... LA PLEJ FAMA ESTAS TIU UZITA EN LA KONSTRUEJO DE LA TUNELO SUB LA MANIKA KANALO, JE 1883. LIA TUNELBORA MAŜINO KAPABLIS BORI 400 METROJN EN UNU SOLA MONATO!
TUNELO SUB LA MANIKO? ĈU TIO ESTAS REVO?
NE, MALNOVA AMIKO. ONI BORIS PRESKAŬ DU KILOMETROJN EN UNU FLANKO KAJ ALIA DE LA KANALO. SED LA PROJEKTO ESTIS FORLASITA EN JULIO 1883, PRO POLITIKAJ KIALOJ. LA ENIREJOJ ESTIS MASONFERMITAJ.
KIEL TIO RILATAS AL LA DISKO?
NENIEL. BEAUMONT TIUMOMENTE LABORIS PRI SERURO NEKREDEBLE RAFINITA, KIES ŜLOSILO ESTIS METALPECO KIEL TIU, KIUN VI HAVAS. MIASCIE, NENIU KAPABLIS ELTROVI LA PRINCIPON DE ĈI TIU MEĤANISMO.
ĈU IU DAŬRIGIS LA IDEOJN DE BEAUMONT?
DU INĜENIEROJ BATALIS EN TIU TERENO, PRESKAŬ EĈ FIZIKE: MIA KONATO, SIRO MORDAUNT FORTESCUE KAJ ALIA VIRO, BEDAŬRINDE MORTINTA ANTAŬ DEK JAROJ, BYRON GARRISON...
KIO?!
13


DUMTEMPE...
SPRATT ESTAS EN TAVERNO, KIEL KUTIME! JEN ĜI, «LA TRI ĈAPELOJ».
Three Hats
SALUTON, SINJORO SPRATT!
RIGARDU BONE LA KOLORON, MIA KNAB', KAJ KIA AROMO, PROKSIMIGU LA NAZON! «AMONTILLADO», LA ABSOLUTA EKVILIBRO INTER SEKA KAJ KREMA ŜEREO!
WOODY, DONU PO UNU GLASON POR ĈIU. ĈI-NOKTE, MI SENTAS MIN PRETA POR ŜEREO...
SINJORO SPRATT, BONVOLU DIRI AL MI ĈION, KION VI SCIAS PRI BYRON GARRISON.
MALMULTE. VI DEVUS DEMANDI CHIP-ON GOSLING, LI LABORAS EN LA OFICEJO DE PATENTOJ. SED MI AVERTAS, ANDY, KE LI NUR DRINKAS MALNOVAN MADEJRAN VINON...
FAKTE, ALVENIS LIA MOMENTO MANĜETI... HE, CHIP!
CHIP, ĈI TIU JUNULO ĴUS PROMESIS AL NI BARELON DA MADEJRA VINO KONTRAŬ ĈIO, KION NI SCIAS PRI BYRON GARRISON. ĈU NE, JUNA VIRO?
!!
WOODY, NI VOLAS VIAN PLEJ BONAN MADEJRAN VINON. LA JUNULO PAGOS.
BYRON GARRISON? TRE PRETENDEMA INĜENIERO. LI KVERELIS KUN LA REĜA RONDO DE ELEKTRO-INĜENIEROJ, DEK KVIN JAROJN ANTAŬE. KIA SKANDALO! LI CELIS KONKRETIGI LA ESPLOROJN DE PASINTJARCENTA INĜENIERO: FREDERICK BEAUMONT. LI ESTIS ULO, KIU KONSTRUIS TUNELBORAJN MAŜINOJN KAJ TRAJNOJN DE KUMPREMITA AERO. ESTIS ANKAŬ ALIA VIRO, MORDAUNT FORTESCUE, ALIA FANFARONULO, KIU ANKORAŬ HAVAS SIAN LABORATORION APUD LA KVARTALO GOLDERS GREEN...
BARCLAY'S
WOODY, NUN NI BEZONAS «SERCIAL», ALIAN MADEJRAĴON. LA JUNULO BEZONAS ION PLI MALFORTAN.



TIUN NOKTON...
VE...
NU, MIA KNAB', VI TROVIS SPRATT-ON, VERŜAJNE.
MAJSTRO, MI NE PLU IGNORAS LA RESPEKTIVAJN MERITOJN DE «RAINWATER», «SERCIAL», «VERDELHO», «BOAL» KAJ ĈIUJ ALIAJ MADEJRAJ VINOJ. KIA ODISEADO!
TIO ESTAS FLANKA KONSEKVENCO. NI KOMPARU LA AKIRITAJN INFORMOJN, ANDY.
ELSTARA INĜENIERO, FREDERICK BEAUMONT, KONATA PRO SIAJ EKSTERORDINARAJ ATINGOJ DUM LA UNUA PROVO BORI TUNELON SUB LA MANIKO EN 1883.
NI SCIAS, KE BEAUMONT POSTLASIS KELKAJN GRAVAJN PROJEKTON NEREALIGITAJN. INTER ILI TROVIĜAS TRAJNO FUNKCIANTA PER KUNPREMITA AERO, KAJ TRE KOMPLEKSA SERURO, PRI KIU NI APENAŬ HAVAS INFORMON.
TAMEN, LA ŜLOSILO POR TIU SERURO ESTAS ĈE NI.
EN ĈI TIU AFERO ESTAS DU PLIAJ INĜENIEROJ, ANKAŬ ELSTARAJ: GARRISON KAJ FORTESCUE. ILI AMBAŬ SEKVIS LA TEĤNIKAN ONDON LASITAN DE BEAUMONT. LA DUA ANKORAŬ LABORAS EN LONDONO.
LA UNUA SUPOZEBLE FORPASIS EN LA BRULEGO DE SIA DOMO, ANTAŬ DEK JAROJ.
TAMEN NI HAVAS DU INDIKAĴOJN PRI TIO, KE GARRISON ANKORAŬ AKTIVAS: LA METALAN DISKON KAJ LA INTENCOJN DE CALBOUR KAJ WILLCOTT. NI DO DEVAS KOMENCI LA SERĈADON PERE DE ĈI TIU ŜLOSILO, ANDY. ANTAŬEN!
ANTAŬEN, SED AL KIE?
AL KIE, DO? AL TIE, KIE ESTAS LA PORDO, EVIDENTE!
!!
15


KIEN NI DIREKTIĜAS, MAJSTRO?
AL LA MAGAZENO DE CALBOUR KAJ WILLCOTT. REMEMORU LA VORTOJN DE WALT SNOTTS. MUROJ TURNIĜANTAJ...
EBLE TIO ESTIS SIMPLA BABILADO DE EBRIULO. CETERE, KIA IDEO, ENIRI EN LA FAŬKON DE LUPO!
VENU ĈI TIEN, ANDY. NI TRANSIROS TAMIZON. EBLE ONI ATENDAS, KE NI IRU, SED NE LAŬ LA RIVERO.
CALBOUR & WILLCOTT
VE, TIO ESTAS LA KAMIONO DE WALT SNOTTS. KIAL ĜI ESTAS ĈI TIE, INTER FERAĴOJ?
DIABLE! SANGO...



NI NE RESTU ĈI TIE, MIA KNAB'. JEN LA MALANTAŬA MURO DE LA MAGAZENO.
BONDED
EHOUSE
MAJSTRO, MI REKONAS TIUN PORDON. ĜI ESTAS LA PORDO DE LA TERETAĜO DE LA MAGAZENO.
JEN LA OFICEJO DE LA DU ESTROJ. NE EĈ UNU PAPERO VIDEBLA.TIUJ DU RETRETIS, VERŜAJNE.
HELPU MIN TIRI LA KURTENOJN, ANDY, NI TRASERĈOS LA OFICEJON DETALE.
SED, MAJSTRO... KION VI CELAS TROVI?
LA SERURTRUON, JUNA VIRO!



KVANKAM MI SERĈADIS, MI NE VIDAS SERURON, MAJSTRO.
TIAL ĜI DEVAS ESTI ANTAŬ NIAJ OKULOJ MEM. ESTAS LOGIKE!
HA! RIGARDU, ANDY, ONI LASTATEMPE CEMENTIS LA FIKSILON DE ĈI TIU KURTEN-HOKO. MI VETAS, KE...
CLAC
BONEGE!
CLAC
BRRRRR
?
ĈI TIU OFICEJO ESTAS MULTE PLI LUKSA OL LA ALIA.
PRAVE, MIA KNAB'. SED KIA FETORO!
RIGARDU, MAJSTRO. LA ODORAĈO VENAS DE ĈI TIUJ KESTEGOJ.
HAAAAAA


EK, ANDY, NI TRASERĈU ĈI TIUN ĈAMBRON. ONI NE RESTU ĈI TIE DUM MULTE DA TEMPO.
SNOTTS KAJ LAMA BEN... NIAJ AMIKOJ NE LASAS ATESTANTOJN POST SI...
MAJSTRO, JEN PAPEROJ SUB LA TIRKESTOJ!
MISTERA MALAPERO DE JUNA ALIENISTO OLIVER QUINN
CALBOUR & WILLCOTT
SENINTERESA LETERO KAJ ĴURNALA ARTIKOLO. HO, KIEL KURIOZE!
NU, JUNA VIRO, NI FORIRU. ĈI-NOKTE NI NE ELTROVOS PLI DA INFORMO...
OLEFFE _ GRENSON 19.



KIO? ĈU KADAVROJ DENOVE?! JAM DELONGE CROSS NE ALPORTIS MALVARMAN VIANDON AL NI...
WAN
BONE... SENDU SKIPON AL LA LOKO!
MIAOPINIE, ANDY, WINGFIELD VERŜAJNE NE ŜATOS LA MALKOVRON, KIUN NI FARIS HIERAŬ NOKTE.
TIO TENOS WINGFIELD-ON MALPROKSIME DE NI DUM KELKAJ HOROJ. ALVENIS LA TEMPO FARI VIZITON AL INĜENIERO MORDAUNT FORTESCUE, KIU LAŬDIRE LOĜAS EN GOLDERS GREEN.
MATTS AUSTIN
6
NU, SINJORO MORDAUNT FORTESCUE ŜAJNE NE HAVAS SUFIĈE DA KAPABLOJ POR BONTENI SIAN DOMON.
TOC TOC
FINFINE ONI MALFERMAS LA PORDON! VE, KIOM DA RIGLILOJ VI HAVAS?
CLIC CLAC
FORIRU! LASU MIN TRANKVILA, MI NENION BEZONAS!



VLAM
?!
DIABLE, ĈI TIO NE PROGNOZAS AMIKAN INTERVJUON.
KIEL KURIOZE! TIU VIRO NE RESPONDAS AL LA MENSA BILDO, KIUN MI HAVIS PRI MORDAUNT FORTESCUE. MAJSTRO, SE VI PERMESAS, MI ŜATUS TELEFONI AL CHIP GOSLING.
EN ORDO, ANDY. IRU PER LA AŬTOMOBILO. DUME, MI ĈIRKAŬRIGARDOS ĈI TIUN STRANGAN KONSTRUAĴON.
MONEY LENT
ĈI TIU PORDO ESTAS TRO TENTA... MI PROVU UZI LA DIRKON.
?!


HA LO! JES, CROSS ESTAS ĈI TIE! NI AGU RAPIDE. BONE, MI TUJ IROS!
IOM TRO HASTEMA, TIU ETA VIRO. ĈU LI MALAPERIS?
KIA FETORO! VE, KIO ESTAS ĈI TIO?
DIO MIA, KIA TERURAĴO!



TIC TIC TIC
TIC TIC TIC
ĈI TIO ESTAS JA TRE INTERESA!
SED KIO ESTAS TIU BRUO?
TIC TIC TIC
!
TIC TIC TIC
TIC TIC
RAPI-DE!
TIC
TIC TIC TIC
23


DIO MIA, LA MAJSTRO!
MAJSTRO... MAJSTRO! ĈIELO, NE EBLAS MALFERMI LA PORDON!
KLING
!


VENU, MAJSTRO!
ANDY, LAŬDON AL DIO!
HASTU, MIA KNAB', ĈI TIU LOKO BALDAŬ PLENIĜOS JE POLICANOJ.
MI VIDIS KADAVRON DE GRANDA VIRO, KUN RUĜAJ LIPHAROJ KAJ VANGHAROJ.
TIU ESTIS MORDAUNT FORTESCUE, SENDUBE!
CHIP GOSLING PRISKRIBIS LIN AL MI KIEL GRANDULON KUN HELRUĜA HARARO... KIU ESTAS TIU MALGRANDULO, KIU MALFERMIS LA PORDON ANTAŬE, DO?
PROBABLE TIU ESTIS LA MURDINTO. NI INTERROMPIS LIAN PRISERĈADON.
POSTE, EN STRATO BAKER...
EK, SINJORINO STONE, TELEFONU AL KURACISTO PARTRIDGE. LA MAJSTRO VUNDIĜIS!
ĈIELO, SINJORO! KIAM VI ELEKTOS LABORON TAŬGAN POR ĜENTLEMANO?
LA RIKOLTO NE ESTIS TIEL MALBONA... PORTU ĈI TIUJN KONSTRUPLANOJN AL MATTS PETRONIO, LA FAKULO PRI AŬTOMATOJ. MI CERTAS, KE LI POVOS ELTIRI IUN KONKLUDON EL ILI.
VE, SINJORO CROSS, KIO OKAZIS AL VI? MI NUR VOLIS KONTROLI ĈU VI HAVIS NOVAĴON... KIEL TERURE! ESPEREBLE HOWARD...
SALUTON, BARBARA. MIN ĜOJIGAS REVIDI VIN. LA ESPLORADO PROGRESAS, KIEL VI POVAS VIDI.
25
MI VIDIS LA MORTON DE PROKSIME, FRAŬLINO COLLINWOOD, JE LA MILA FOJO EN MIA TERURA KARIERO, EBLE. IUN TAGON ĜI FINE TRAFOS MIN.


LA SEKVAN TAGON.
MORNING STAR
LA FINO DE INĜENIERO
JEN LA ASPEKTO DE TIU KOMPATINDA FORTESCUE, DO!
LA POLICO NUR TROVIS HOMAJN RESTAĴOJN. ESTAS SUPOZATE, KE ILI APARTENAS AL SINJORO MORDAUNT FORTESCUE.
LONDON DESPATCH
SUPERINTENDANTO WINGFIELD DEKLARIS, KE LA ESPLORADO ESTOS LONGA KAJ MALFACILA... NU!
TAMEN, UNU PLIA SPURO POVAS MAL-LONGIGI ĜIN.
LA VIZITO JA IGIS MIN FARI KONSIDERINDAJN PROGRESOJN, JUNA VIRO. MANKAS KELKAJ KONFIRMOJ, KAJ MI SCIOS ĈION, KION KAŜAS ĈI TIU MISTERO!
SED, MAJSTRO... KIU ESTIS LA MALGRANDULO ĈE LA DOMO DE FORTESCUE? KION LI SERĈIS TIE? KIEN IRIS CALBOUR Y WILLCOTT?
MI HAVAS MIAJN KONJEKTOJN. ĈU VI MEMORAS LA ARTIKOLON TROVITAN EN LA SEKRETA OFICEJO DE CALBOUR KAJ WILLCOTT, TIUN PRI LA MALAPERINTA ALIENISTO, OLIVER QUINN? BONE, MI FAROS VIZITON AL MATTS PETRONIO!
ĈU?
SALUTON, MATTS!
CARLAND, DIO MIA, KIEL TERURE, KIEL TIMIGE!



ĈU VI VIDIS TION, KIO OKAZIS AL MORDAUNT FORTESCUE? KOMPATINDULO... MI CERTAS, KE LA FAJREGO ESTIS INTENCA. ONI VOLIS ŜTELI LIAJN DOKUMENTOJN.
ĈU VI POVIS ELTIRI IUN KONKLUDON EL LA PAPEROJ, KIUJN MI SENDIS AL VI HIERAŬ?
JES JA, MIRINDEGE! LA PRINCIPO DE LA TUNELBORA MAŜINO DE BEAUMONT, RIĈIGITA PER ĈIUJ PROGRESOJ DE LA NUNTEMPA SCIENCO. MANKAS KELKAJ MEĤANIKAJ DETALOJ, SED LA MAŜINO PRISKRIBATA EN LA KONSTRUPLANOJ DEVUS FUNKCII. SED KIEL VI AKIRIS ILIN...?
PARENTEZE, MATTS, ĈU VI KONIS HIDAN MALBON-HUMORAN VIRON KUN GRAKA VOĈO, KIU FRE-KVENTIS LA MEDION DE FORTESCUE?
JES. TIU ESTAS MOLES, ABRAHAM MOLES. SPECO DE HELPISTO, KIES HELPON LI FOJFOJE PETIS...
DANKEGON, MATTS, ADIAŬ. PRIZORGU BONE VIAJN AŬTOMA-TOJN. TIO ĈI ESTAS LA VERA FELIĈO.
SED...!
NUN, MI NUR DEVAS AVERTI LA METROPOLAN POLICON.
MATTS PETRONIO
MI DEZIRUS PETI AŬDIENCON ĈE LORDO BASINGSTOKE. ESTAS URĜA AFERO.
MI SCIIGOS TION AL LI, SINJORO.
KIA KOINCIDO! MI SERĈIS EKZAKTE VIN, SINJORO CROSS. LA REGISTARO MAL-TRANKVILIĜAS PRO TIUJ MALAPEROJ KAJ TIUJ... MORTOJ.
KREDEBLE MI POVOS KLARIGI AL VI, SINJORO...
TIUN TAGON, LA MAJSTRO RICEVIS PLENPOVON. LA TUTA POLICO DE LA REĜO ESTIS JE LIA DISPONO ...
27


KELKAJN TAGOJN POSTE, ĈE LA MARBORDO DE KENT...
MAJSTRO, NI PRISERĈIS ĈIUN ANGULON DE LA LANDO DE ANTAŬ TRI TAGOJ. ĈI TIU LOKO ESTAS DEZERTA EN ĈI TIU EPOKO, KAJ KROME, LA VETERO...!
JEN NIA RIFUĜO, ANDY. TIE NI POVOS RIPOZI.
MI PREPAROS POR VI TASON DA TEO.
BONE, JUNA VIRO. TIO HELPOS MIN PRIPENSADI.
PRI LA TUNELO, ĈU NE?
LA MALNOVA 1880-A KONSTRUEJO DE KRUTAĴO ABBOTT ESTAS FORLASITA. ILI NEPRE ORIENTIĜIS AL LA NORDO DE LA MARBORDO DE SANKTA MARGARETA. LA TIEAJ SABLOBENKOJ NE PERMESAS LA ALPROKSIMIĜON DE ŜIPO. ESTAS TUTE LOGIKE!
Densole
Ewell Minnis
Alkham
Wolverton
Hawkinge
South Alkham
West Hougham
DOVER
Church Hougham
DANGER AREA
A 20
Abbot's Cliff
Shakespeare Cliff
Western Docks
Eastern Docks
East Cliff Sands
Martin
West Cliffe
B 2058
B 2060
SED MAJSTRO, KIUN RILATON HAVAS TIO KUN LA MALAPERINTA MEDICINISTO, TIU OLIVER QUINN, KIUN VI SERĈAS ĈIE? MI KREDIS, KE NI SERĈIS HOWARD-ON COLLINWOOD.
ESTAS DOMARO KELKAJN MEJLOJN FOR...
28.


LA PLUVO ĈESIS, ANDY. NI IRU AL RINGWOULD.
SALUTON?! ĈU ESTAS IU HEJME?
KION VI VOLAS? ĈU VI ESTAS DOGANISTOJ?
TRANKVILIĜU, NI ESTAS NUR VOJAĜANTOJ SERĈANTAJ INFORMON!
ĈU VERE VOJAĜANTOJ, EN ĈI TIU IZOLITA LOKO, ĈI-SEZONE? NU, VI JA NE HAVAS ASPEKTON DE DOGANISTOJ. ĈU VI VOLAS BONAN KONTRABANDITAN KONJAKON? AŬ EBLE VI PREFERAS DU TASOJN DA HINDA NIGRA TEO?
ĈU? KOMPRENEBLE MI MEMORAS TIUN JUNAN VIRON... LI ESTIS ĈI TIE ANTAŬ KELKAJ MONATOJ. LI PRUNTEPRENIS MIAN MAPON DE LA KLIFOJ. MI JA NE REVIDIS LIN... TAMEN LI ASPEKTIS TRE AFABLA!
LI MEM KULPAS. LI OBSTINE DEZIRIS IRI AL LA DOMEGO WILLSON. TIU LOKO NE ESTAS REKOMENDINDA, SINJOROJ! ĈEFE NE EKDE LA BRUOJ EKSONIS!
KIUJ BRUOJ?
29


SONOJ DE MORDO, GRANDEGAJ MORDOJ. ONI DIRUS, KE ILI VENAS EL SUB LA MARO MEM!
ĈU LA DOMEGO WILLSON ESTAS EN-LOĜATA?
ŜAJNE TEMAS PRI RIPOZDOMO, TAMEN NENIU VIDAS IUN PACIENTON. SED ONI LIVERAS AL TIE GRANDAJN KVANTOJN DA MANĜAJO!
ĈU VI NENIAM PENSIS ĈIRKAŬRIGARDI?
HO NE, LA BIENO ESTAS TRE GARDATA, KAJ NE EBLAS VIDI ION DE EKSTERE. KASTELO KONSTRUITA APUD FENDEGO ĈE KLIF-BORDO. MI SCIAS TION ĈAR, KIAM MI ESTIS INFANO, ONI AMUZIĜIS LUDANTE EN ĜIA SUBTERETAĜO.
SUBTERETAĜO?!
TIUTEMPE, LA DOMEGO WILLSON ESTIS FORLASITA. ONI POVIS ALIRI AL LA KASTE-LA KELO PERE DE LA KAPELO.
ĈU TIU SUBTERA PASEJO ESTAS ANKORAŬ IREBLA?
SENDUBE JES!
MI DONOS AL VI BONAN MON-DONACON SE VI KONDUKAS NIN AL LA SUBTERETAĜO...
ĈU MI RAJTAS DEMANDI, KIE NI POVAS TELEFONI?
HO, JES! ĈI TIE...
LA ENIREJO ESTAS TUTE EGALA, SED MI NE POVAS CERTIGI VIN, KE LA VOJO ESTAS IREBLA ĜIS LA FINO.
30



RIGARDU, ANDY! NI ALVENIS... JEN LA KELO!
VE! NE EBLAS ENIRI!
MAJSTRO, VENU! JEN ALIA GALERIO!
RIGAR-DU!


MAJSTRO, ĈU LI NE DIRIS, KE LA KASTELO ESTIS KONSTRUITA APUD FENDEGO?
LA FENDEGO ESTAS PLENA JE RUBAĴOJ, ANDY. ĈIT, IU VENAS!
HE, SNOTTY, ĈU VI NE AŬDIS ION?
NE MAL-TRANKVILIĜU, MUFF... LA NOKTO ESTAS TIEL SERENA KIEL ĈIAM.
EK. POST KELKAJ HOROJ, ONI ANSTATAŬOS NIN.
PRAVE, SNOTTY!
IU SPECO DE FOSAĴO KONDUKAS AL LA KASTE-LO. KIAM NI ALVENOS AL TIE, NI FAROS PLANON.
MAJSTRO, JEN VENTOLEJO!




ĈU VI AŬS-KULTIS, MAJSTRO?!
GRRROUM
?
VI NE KAPABLIS KURACI KOMPLETE LA FILINON DE GARRISON. LA MALJUNULO DENOVE RIFUZIS KUNLABORI...
33.



TIU SPECO DE KURACADO BEZONAS MULTE DA PACIENCO, SINJORO. KAJ MULTE DA AMA PRIZORGO...
AMO! NE RIDIGU MIN!
MAJSTRO, ATENTU! IU VENAS!
SED... ĈI TIU KASTELO ESTAS TUTE MALPLENA!
ĈIELO! VIDU ĈI TION!
EK, ANDY! SUPREN!
LA MALAPERINTAJ MASONISTOJ, MIA KNAB'.
KIUJ ESTAS TIUJ KOMPATINDULOJ?
34.


TIUJ VIROJ ESTIS REDUKTITAJ AL SKLAVECO. LA KRIMULOJ UZAS ILIN POR ŜUTI EN LA FENDEGON ĈIUJN RUBAĴOJN ELPRENITAJN EL LA MARO. ĈI TIO ESTAS MALHUMANA!
NI NE HEZITU PLU! KOMENCIĜU LA AGADO!
NENIU ĈI TIE!
JEN MAJSTRO! ŜTUPARO AL LA SUBTERETAĜO!
KIA DESCENDO!
NI NE ESTAS FOR DE LA MARNIVELO.
SED... JEN LA DOMEGO GARRISON!
35



HAAA! KOMPATON MI PETAS! NEEE!!
HASTU, MAJSTRO! ONI MORTIGAS IUN TIE!
ĈIUJ LEVU LA MANOJN!
CROSS!
MI ĜOJAS, KE MI REVIDAS VIN, SINJORO CALBOUR!
PAW
PAW PAW
LA KOŜMARO FINIĜIS, SINJORO GARRISON!
EK, SINJORO, LIBERIGU LA ALIAJN! LA SUBTERETAĜO, MALANTAŬ LA DOMO. OLIVER OKUPIĜOS PRI NI!
NI IRU TIEN, ANDY. ANTAŬ OL LA ALIAJ REAGOS.
MAJSTRO, ŜAJNAS KE NI MALSUPRENIRAS EN LA INFERON.
JA TIEN NI IRAS, ANDY!
36



KRAK!
?
RAAH
ANTAŬEN, ANDY. ĈI-FOJE LA FINO ESTAS PROKSIMA.
RIGARDU, MAJSTRO! JEN LUMO!
37


!?
NI GLITOS AL LA TUNELBORA MAŜINO...
MAISTRO, RIGARDU! HOWARD COLLIN-WOOD ESTAS TIE!
MI ORDONAS, KE VI TUJ REFUNKCIIGU ĈI TIUN MAŜINON, HOWARD COLLINWOOD!



TIO ESTAS FRENEZAĴO! LA KALKŜTONO EKFENDIĜAS. ONI NE POVAS ANTAŬENIRI!
NE DEVIGU MIN ENPAFI KUGLON EN VIAN ŜULTRON!
MI NE FARUS TION, SINJORO WILLCOTT!
CROSS!!!
SED KIEL DIABLE VI...?
SALUTON, HOWARD. MIA NOMO ESTAS CARLAND CROSS. VIA FRATINO BARBARA PETIS, KE MI ELIGU VIN EL ĈI TIU TERURA EJO.
MI...
ATENTU, MAJSTRO! LA GARDISTOJ REVENAS ĈI TIEN!
EKPAFU, VI ĈIUJ! PAFU SENINDULGE!
RAPIDU! ĈIUJ EN LA MAŜINON!
BANG
BANG
BANG
BANG
BANG
BANG
ZWIIIII
BRRRRR
39


BBBBBRRRRRRRRRRRRRRRRRRRR
KION VI PLANAS, HOWARD?
LA TEGMENTO DE LA TUNELO FENDIĜAS. ĜI POVAS ENFALI SUR NIN JE AJNA MINUTO!
MI STARTIGOS ĈI TIUN AĈAN MAŜINON!
GROOOOMM
ATENTU, ULOJ! ĈI TIO NE ASPEKTAS BONE! NI REGRUPIGU LA LABORISTOJN EN LA SUPRA ĈAMBRO.
NEEEEEEEE!
AAA
40.


AAGHH
BR
RRRRRRRRR
RRR
NEEEEEE!
MOLES!
AAHH
DIO KOMPATU TIUN MALFELIĈULON. NI TUJ FUĜU EL ĈI TIE!
HO ĈIELO, LA TUNELO ESTAS PARTE INUNDITA!
EK, NI MALPROKSIMIĜU DE TIU DIABLA MAŜINO TIOM, KIOM EBLAS!
LA TEGMENTO! ĜI ENFALOS!


NEEE!
42.



DANKON, ULOJ. SED KIAL VI NE FUĜIS?
LA GARDISTOJ MALPERMESAS NIAN ELIRON, SINJORO.
JES, ILI STARAS EN LA ELIREJO, KAJ NE PERMESAS AL NI ESKAPI EL ĈI TIE, AŬ ILI EKĈASOS NIN KIEL KUNIKLOJN.
MI PROVOS KONVINKI ILIN.
AŬSKULTU, MI NOMIĜAS CARLAND CROSS. LA AKVO SUPRENIRAS SENHALTE. INDULGU LA VIVOJN DE ĈI TIUJ SENKULPULOJ, SE VI ANKORAŬ HAVAS IOM DA HUMANECO.
VI ĈIUJ MORTOS KIEL RATOJ EN TRUO. NI MINIS LA ENIRGALERION. ĈIO EKSPLODOS. ADIAŬ, SINJORO CROSS!
ALMENAŬ INDULGU LA PLEJ JUN...
BOOM


NU, ĈU VI ĈIUJ DORMAS ĈI TIE? ĈU NENIU AŬDIS LA AVERTOPAFON?
WINGFIELD!
JEES!
MI NENIAM ANTAŬE SENTIS TIOM DA ĜOJO VIDANTE VIN, AMIKO!
KAJ MI, CARLAND. JAM ESTIS TEMPO... VENU, LORDO BASINGSTOKE ATENDAS NIN.
BONEGA AMAS-ARESTADO, CROSS! ĈI TIE DISVOLVIĜIS TERURA KOMPLOTO!
SED PRI KIO TEMAS ĈIO ĈI?


FRENEZA PROJEKTO, SENDUBE NEKREDEBLA. LA PLEJ TERURA MINACO IAM PLENUMITA KONTRAŬ LA SUVERENECO DE ANGLUJO. SEKRETA TUNELO, KIU LIGAS KENT-ON KUN LA FRANCA MARBORDO, KIE PROBABLE ONI MALKOVROS KONSTRUEJON SIMILAN AL ĈI TIU.
SED KIAL?
OKAZE DE KONFLIKTO, ĈI TIU SPECO DE TUNELO HAVUS KONSIDERINDAN VALORON, KAJ STRATEGIE KAJ FINANCE. DUME, ĜI POVUS SERVI AL KONTRABANDAJ CELOJ, POR KREVIGI LA PLEJ SANKTAJN FUNDAMENTOJN DE NIA LANDO.
KELKAJ SENSKRUPULAJ INDIVIDUOJ CERTE SENTUS LA TENTON UZI LA TUNELON POR NERIMARKITE ENIGI FREMDAJN MANĜAĴOJN EN NIAN LANDON!
KIA TERURAĴO!
NU, KAJ LA INSTIGINTOJ?
KRIMULA DUOPO SALAJRATA DE IU FREMDULO. CALBOUR KAJ WILLCOTT, KAŜNOMO: MOLES. ILIAJ VERAJ NOMOJ ESTIS KAHLBRUNN KAJ WILLKOTZ. ILI KAŜIĜIS SUB LA TRANKVILIGA FASADO DE KONSTRUFIRMAO, KAJ ILI NE HEZITIS FORKAPTI VIRON KAJ LIAN MALSANAN FILINON, BRULINTE ILIAN DOMON.
LA MORTO DE TIUJ MALFELIĈULOJ FORPRENIS ILIN DE VERA JUSTECO. RILATE AL ILIAJ KUNKULPULOJ, ONI SEVERE PUNOS ILIN.
SED... MAJSTRO...
SUFIĈE DA STIMULOJ EN UNU TAGO, ANDY. VI VOLEGAS IRI HEJMEN, ĈE STRATO BAKER.
KIEL KUTIME, LA GAZETARO EĤAS LA AFERON.
The London Despatch
Encore Carland Cross
Après les terribles affaires du "Puits de Lumière" et de "La Goule de Shadwell" Carland Cross reprend une fois de plus
Au cours des dix années de son terrible calvaire, Byron Garrison a réussi à percer les secrets de F. Beaumont et à construire sa mystérieuse serrure à jeton. Une étape sans doute décisive dans l'histoire de la mécanique et dans la mise au point du tunnelier, machine fabuleuse née du génie britannique. Comme le reconnaît lui-même Byron Garrison, rien n'aurait été possible sans les découvertes de son rival, Sir Mordaunt
Sir Mordaunt Fortescue, assassiné par l'infâme Abraham Moles qui, sous les traits de Wilbur Willcott, espionnait l'ingénieur.
Byron Garrison
News of England
Les visites nocturnes aux ruines de Garrison Manor, la réplique souterraine du château détruit, l'enlèvement de l'aliéniste Oliver Quinn autant de "chocs" dans le traitement de Jenny Garrison, rendue folle par l'incendie criminel...
Un chantage odieux
Des soins pour sa fille contre les plans d'un tunnelier! Voilà le chantage ignoble qui
45.




MICHEL OLEFFE

OLIVIER GRENSON

DUM LA 19-A JARCENTO EKBURĜONIS GRANDEGA SERIO DA PROJEKTOJ POR PERMANENTE KUNLIGI ANGLUJON KUN LA NORMANDIA MARBORDO. TUNELOJ SUBMARAJ, ĈU TUTE AŬ PARTE, SURMARAJ FERVOJOJ, TRAJNAJ VIADUKTOJ, PENDANTAJ PONTOJ, MONUMENTAJ HAVENOJ. EL ĈIUJ TIUJ PROJEKTOJ, NUR LA TUNELO INTER SANGATTE KAJ LA KENT-A MARBORDO ATINGIS IAN REALIĜON, INTER 1882 KAJ 1883.

DANKE AL LA TUNELBORA MAŜINO DE INĜENIERO FREDERICK BEAUMONT, LA BORADO PROGRESIS DU KILOMETROJN EN AMBAŬ FLANKOJ DE LA KANALO, SED LA LABORADO ĈESIS EN 1883. LA GALERIO ANKORAŬ EKZISTAS, EN LA KLIFO SHAKESPEARE, INTER DOUVRES KAJ FOLKESTONE.

LA KRIMA PROJEKTO DE CALBOUR KAJ WILLCOTT, MALSUKCESIGITA DE CARLAND CROSS EN LA JARDEKO DE 1930, ESTIS SILENTIGITA POR ŜTATAJ KIALOJ. LA DOMEGO WILLSON, LA ENIREJOJ, LA KANALO KAJ LA STRANGA KOPIO DE LA DOMEGO DE INĜENIERO GARRISON ESTIS DINAMITITAJ, KAJ LA TIAMAJ ATESTANTOJ ĴURIS NENIAM MALKAŜI ION PRI LA AFERO.

